EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

**EKO 2023 / 61. Oktobro 27, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 305 KB. Alkroĉaĵo: 760 KB. Sume: KB 1105.**




## La tago de Homaj Rajtoj:

### la 10-a de decembro

Jen la afiŝo de UEA en Esperanto, la angla, hispana, irlanda kaj portugala. Pliaj lingvoj aldonataj. Eluzu ĝin lige kun la Zamenhofa Tago, kvin tagojn poste. Preparu jam nun viajn planojn por la festado: loke, lande kaj fake! Kaj raportu la rezultojn al EKO, revuo *Esperanto*, IPR kaj aliaj gazetoj rapide la rezultojn de via agado por la du festoj ĉe vi!

La afiŝo estas en preskvalito (4.6 MB) de la adreso: https://drive.google.com/drive/folders/1uare_vXIa_0bV26vvIrWmiEv9l5ymKDV

**Decembro estu nia monato!**
**Kial Patro Kristnasko**
**ne havu konkurencon?**

## Filmo pri la vivo de D-ro Zamenhof

https://www.facebook.com/100014743428404/posts/1190524351449001/?sfnsn=mo

Ĝoje spektu tiun ĉi filmeton pri la vivo de Ludoviko Zamenhof kaj, se vi volas, dissendu ĝin al viaj esperantlingvaj geamikoj. Vi povas ankaŭ prezenti ĝin dum viaj klubkunvenoj. Mi ricevis ĉi tiun interese faritan filmon kaj plusendas ĝin al vi.

**Josef Kříž, Ing, pere de s-ino Pasztor Adri en Hungario.**

## Kvarlingve tra Afriko

Mi nun ekdiskonigas Esperanton rete uzante kvar lingvojn. Mi uzas vacap-kanalan-grupon….

Mana Namutema Brinson, Tanzanio


## Tonkin plugadas nian sulkon pri la eksteraj rilatoj

UEA ricevis inviton de CoNGO (la kunsido de ne-registaraj organizoj) por ties Tutmonda Tema Vebinaro (reta komunikilo) pri “Rilatoj UN-NROj: Plibonigi Multflankismon, protekti aliron al UN fare de NROj, civilan spacon kaj demokratian interkomunikadon” kiu okazis la 27-an de oktobro.
Bona reprezentiĝo de esperantistoj en la aranĝo estus signo pri nia seriozeco kaj nia deziro kunlabori. Cetere, la temo estas tre grava por ni: malfacilas enpenetri la decidajn organojn de UN. Ni lernu kiel pli bone fari tion.

**Humphrey Tonkin**




**Brazila Muzika Klubo**
brazilakolekto.com/brazilmuzikaklubo
**Brazila Kolekto**
brazilakolekto.com; brazilakolekto@gmail.com




## Rekono de merito en la kuba movado

La multjara esperantisto kaj instruisto Julián Hernández Angulo prezentis la finan ekzercon por akiri la plej altan instruistan rangon, tio estas: profesoro-doktoro ĉe la Pedagogia Universitato Enrique José Varona en Havano, la 20-an de oktobro.  Temas pri grava novaĵo por la nacia kaj internacia esperanta komunumo, ĉar li estas la sola kuba esperantisto kiu posedas tiun gravan kategorion; sendube tio igas nin ege fieraj pro la profesieco kaj multjara universitata agado de Julián Hernández, disvastiganta ĉiam la gravecon de Esperanto kiel internacia lingvo kaj kiel interesa ilo de interkultura edukado. Jen filmo en kiu li kantas melodion, kiun li famigis.

https://mail.google.com/mail/u/0/?hl=en#inbox/FMfcgzGwHLmGKZRklnvrkKGFhKsjqRpj?projector=1

Ariadna Garcia Gutierrez, estrarano pri Informado de KEA

SMG: Per tiu kanto li bonvenigis nin al la kongreso de ILEI en Hanabaniljo en 1990.

## Subotica daŭre agas en la dulingva mezlernejo

Mi organizis instruhorojn pri Esperanto en la mezlernejo „Politeknika Lernejo” (Politehnička škola) en Subotica, Serbio. Komence de oktobro, la estraro de la lernejo konsentis pri mia peto kaj metis anoncon en la Viber-grupojn de instruistoj kaj de klasestroj pri la baldaŭaj retkursoj de Serbia E-Ligo (SEL), kaj mian proponon al klasestroj viziti la instruhorojn (post la interkonsento pri la tempo) por prezenti Esperanton. Ĝis antaŭ nelonge mi laboris en tiu lernejo, kaj dum kelkaj jaroj mi gvidis Eo-fakrondon, do preskaŭ ĉiuj kolegoj konas tion. **Meze de oktobro 2023 mi vizitis ses klasojn** (lernantoj inter 14 kaj 18 jaraĝaj, plus iliaj klasestroj, entute preskaŭ 150 partoprenantoj) kaj prelegis pri Esperanto, kun enkonduka kvizo pri lingvoj. Mi reklamis ankaŭ la baldaŭan retan Esperanto-kurson de SEL, sed ne nur. Kreiĝis listo

de interesiĝantoj (9 lernantoj) kiuj en la estonteco ŝatus esti informitaj pri Esperanto (eventuala fakrondo en la Lernejo, Eo-evento k.a.).

Jen kelkaj fotoj pri la instruhoroj.

La propono por fari similajn prelegojn daŭre validas por aliaj klasoj, se la koncernaj klasestroj invitos min.

Aranka LASLO, estro de la Instruista sekcio de SEL

## Ekskurso tra kursoj

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso nivelo B1
Gvidantonomo kaj aldoninto: Laura Brazzabeni
Loko: Mantova, Italio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27591

------------

Nomo: Studo-semajnfino Esperanto Nederland
Gvidantonomo: Arjen-Sjoerd de Vries
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Bornerbroek, Nederlando
Aldoninto: ineke

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27590

------------

Nomo: Reta paroliga kurso de Esperanto por progresantoj
Gvidantonomo: Radojica Petrović; Aldoninto: arankal
Loko: Beogrado, Serbio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27593

------------

Nomo: Mezlernejo Jules Léquier
Gvidantonomo kaj aldoninto: Murielle Caré
Loko: Plérin, Francio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27592

------------

## Balkane kaj Danube – hele kaj sennube

Jen resumo pri la kunveno de agantoj de balkanaj landoj en la 21-a de oktobro 2023. La kunveno okazis per *Zoom* provizita de Gradimir Kragiĉ el Bosnio-Hercegovino, ĉeestis esperantistoj el Serbio, Hungario, Rumanio, Albanio kaj Bulgario. Oni parolis pri la sukcesa varba agado farita en Serbio kaj pri la organizado de plurnivelaj kursoj. aInteralie la kurso de Zlatoje MARTINOV kiu ĝis nun rikoltis proksimume 40 aliĝojn. Oni parolis pri la venonta kongreso en Rumanio, pri la movado en Hungario kaj agado en Albanio, kie la Esperanto-organizaĵo ricevis permeson de la Ministerio paroli pri Esperanto al la lernantoj de liceo. La prelego okazis kaj kurso eble sekvos (EKO raportis pri tio). Fine oni parolis pri la projekto por trejnado de volontulaj instruistoj kaj trejnistoj organizota en Serbio por aŭgusto 2024. Oni diskutis pri la ebloj por la aliaj landoj peti subvenciojn de Erasmus por ke kelkaj membroj partoprenu. Oni emfazis, ke ankaŭ individuoj rajtas peti subtenon por tiu partopreno sendepende de la asocio.

Resumis Renato Corsetti

## EKO demandas: KIE ESTAS LA REJNA-RODANA GRUPO!?

## Libroj alireblaj danke al IEI en Hago

En la librejo de Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago troviĝas multaj valoraj Eo-libroj: tradukoj de internaciaj literaturaj verkoj, verkoj originale verkitaj en Esperanto, Esperanto-vortaroj en diversaj lingvoj, lernolibroj, inkunabloj k.t.p.
Ni opinias, ke libroj devas esti legataj. La destino de libroj ne estas stari senfine sur la librobreto. La estraro de IEI decidis doni al tiuj libroj ŝancon esti utilaj al homoj kiuj volas lerni Esperanton kaj legi ĝian literaturon. Se vi instruas Esperanton en grupoj kaj vi volas havi librojn por legi kun lernantoj aŭ ebligi al ili memstaran legadon vi povas profiti nian oferton. Internacia Esperanto-Instituto volonte sendos al vi librojn el la librejo. Sendu al ni rakontojn pri via por-Esperanta agado kaj instruado, kaj ni volonte subtenos vian agadon per libroj, kies legado ja estas esenca parto de plibonigado de lingva scio. IEI volas regali homojn, kiuj gvidas kursojn per libroj. Do, se vi mem estas instruisto aŭ kursogvidanto, aŭ konas homojn/klubojn kiuj organizas kursojn, nepre kontaktu nin. Vi povas ricevi librojn por viaj lernantoj.



Kontakto per *Facebook*: Internacia #Esperanto-Legado

## Pioniraj provoj pri AI en Brazilo

Ni ĉiam serĉas manierojn kaj diskonigi Esperanton por alvenigi lernantojn al nia Programo 'Mia Amiko', ĉefe destinita al brazilanoj. Ĉi-jare, 956 homoj jam aperis por lerni Esperanton per nia metodaro. La lasta maniero, kiun ni trovis, estis diskonigi filmetojn faritajn per Artefarita Intelekto (fliki.ai). Traserĉu en Jutubo, pri instruado, kiel uzi ĝin. Ĝi permesas fari nur unu filmeton monate senpage. Do, treege reviziu ĝin antaŭ ol elŝuti kiel mp4. Ĝi faras ĉion surbaze de unu frazo kiun vi donas. Ĝi faras la tekston, la bildaron kaj eĉ ĝeneralan komponadon de ĝi. Tamen post tiu ellaboro, vi povas modifi ĝin laŭvole: vortoj, literfasonoj, ktp. Tamen, ĝi ne povas paroli Esperanton (ankoraŭ!!!). Jen filmeto kiun mi faris. Kaj bonan ŝancon al vi ĉiuj.
https://www.facebook.com/reel/909071287464532

Adonis Saliba, Brazilo

## Hispana kongreso: la Eo-himno en opereca versio

https://mail.google.com/mail/u/0/?hl=en#inbox?projector=1

Alkroĉite: plia ero el AMO 103 de s-ro Ermanno Tarracchini pri Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni

======= vortoj: 1130 ========

**La kolekto de EKO por 2023:** https://www.ilei.info/agado/EKO.php (ĝis 60).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj. PLUSENDU ANKAŬ VIALANDE!

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.